**EKO 2022**
**Esperiga Komuniko**

Subtene al la regiona, landa kaj loka agado

UEA

Kunlaborantoj: Rob Moerbeek, Gbeglo Koffi, Elda Doerfler

**ENHAVO n-ro 63> • Silka vojo • IKU 2023 • Venezuelo • Bourlot < novembro 10**

## EKO 94: kolektado kaj arkivado




En sia saluto SMG emfazis la gravecon prizorgi ne nur kolektadon sed ankaŭ la sisteman arĥivadon de la kolektaĵoj. Tio zorgas, ke la kolektoj ne restu izolitaj kaj konataj nur al lokuloj kaj vizitantoj sed estu pli vaste konataj. Tio ebligas interŝanĝojn de kolektaĵoj kaj pli vastan diskonigon de la haveblo, precipe se ili povos esti elektronike videblaj.

La programo por la seminario jam disiris per EKO.

La seminario okazis kunlabore (unuafoje) kun la aktiva faka asocio de UEA, ELF-AREK (filatelistoj-kolektistoj). Ĝi okazis fine de oktobro, kaj markas la komencon de kunlaboro inter AMO kaj ELF-AREK.

## Laŭdo por AMO, aparte numero 93 kun IKEF

La AMO-seminarioj povas esti tre utilaj, kaj ili meritas laŭdojn, sed mi aldonu ĉi tie, kio estas la parto pri komerco, kiu nuntempe interesas min, kaj eble vin. Al mi plaĉus aŭdi la voĉojn de aliaj universitatanoj, kiuj, kiel mi, instruis komercon, aŭ en bakalaŭraj kaj/aŭ en magistraj programoj (MBA). Kvankam mia fako estis merkatiko, kaj flanke strategio kaj entrepreniko, mi ŝatus paroli kun esperantistoj kiuj iam ajn instruis kurson pri ĉiaj temoj en tipa temaro de MBA-studoj.

Tia dialogo povas helpi kompreni la rolon de Esperanto en Esperanto-komerco. Tio donos perspektivon. Do, se vi estas aŭ estis profesoro aŭ instruisto pri komerco en universitata nivelo, bonvolu kontakti min ĉe <keefeinchina ĉe gmail.com>.

Dennis Keefe

## La silka vojo superbe kaptita

Venu kun ni laŭ la Silka Vojo al malproksima Xinjiang. Jen dokumenta filmo realigita origine en Esperanto fare de Ma-Ga Filmoj (Alessandra Madella kaj Maximiliano Garcia).

MA-GA FILMOJ: LA SILKA VOJO

Amika demando de SMG: Ĉu estas neniu limo al la talento de ĉi tiu estrarano de ILEI? Tiom feliĉa, ke Maksimiliano liveras al ŝi superban materialon pri la silka vojo.

# Israelaj informoj

La Israela Virtuala E-Kunveno (IVEK) temis pri la revuo *Esperanto* - ni kune trarigardis **elektitajn artikolojn de la nova novembra n-ro de *Esperanto*** kaj ankaŭ de la septembra kaj oktobra, i.a. pri la UK en Montrealo, la IJK en Nederlando kaj la spacmisio Artemis, kiu revenigos la homon al la Luno. La Zoom-adreso: https://huji.zoom.us/j/7508982919.

# Ekskurso tra kursoj

La redaktoro de edukado.net informas vin ke aldoniĝis nova ero ĉe la Kursejo.

Nomo: Kurso por komencantoj
Gvidantonomo: Vida Kulikauskiene
Tipo: Nova movada kurso
Loko: Panevezys, Litovio
Aldoninto: vaikuku
Vi trovos ĝin rekte en la paĝo: https://edukado.net/kursejo?kid=27465
----------
Nomo: Zaozhuang-a Universitato
Gvidantonomo: Alessandra Madella
Tipo: Nova universitata kurso
Loko: Zaozhuang, Ĉnio
Aldoninto: Luigia
Vi trovos ĝin rekte en la paĝo: https://edukado.net/kursejo?kid=27467

======

Nomo: Duagrada kurso
Gvidantonomo: Luigia Oberrauch
Tipo: Nova movada kurso
Loko Parma, Italio
Aldoninto: Luigia
Vi trovos ĝin rekte en la paĝo: https://edukado.net/kursejo?kid=27466

# Prelegu por la Kongresa Universitato en 2023

Kadre de la 108-a UK en Torino okazos la 76-a sesio de la Internacia Kongresa Universitato (IKU). UEA invitas proponojn por IKU-prelegoj, kiuj estu sendataj al la IKU-sekretario amri@huji.ac.il plej laste la **31-an de januaro 2023**. Lige kun la IKU okazos studsesio de Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS). Kiel en Montrealo, ankaŭ en Torino la IKU-prelegoj povas esti virtualaj, nome eblos prelegi per Zoom.

La proponoj estu pri interesaj, allogaj temoj kaj taŭgaj por klera publiko. Ĉiu propono enhavu mallongan resumon de la prelego kaj koncizan biografieton de la preleganto – sume ne pli ol unu paĝon. Aparte estas bonvenaj proponoj de personoj, kiuj ne jam aŭ malofte prelegis en IKU. La proponoj estos profesie prijuĝitaj de la IKU-komisiono. Tiuj, kiuj ne estos elektitaj por la IKU, povos tamen esti konsiderataj por

la Scienca Kafejo. Ĉiu preleganto devas esti kongresano kaj mem zorgi pri sia aliĝo – tio estas facile farebla per la reta liĝilo: uk.esperanto.net/2023

Akceptita IKU-prelego estos rekompencita per honorario de 240 EUR. Duono de la honorario dependas de ĝustatempa livero de la teksto por la IKU-libro kaj duono - de la fizika prezentado de la prelego. Pliaj detaloj kaj antaŭaj prelegoj kaj resumoj troviĝas en la retejo de IKU: uea.org/kongresoj/universitato.

Daŭre aĉeteblas la papera versio de la IKU-libro 2022, 158 p., 20 prelego-tekstoj kaj resumoj (inkluzive de la Scienca Kafejo kaj la 38-a Scienca Universitata Sesio okazinta en la 56-a BET en Litovio) kaj multaj ilustraĵoj. Ĝi estas aĉetebla ĉe la Libroservo de UEA (mallonge.net/sc). En la Katalogo vi povas trovi ankaŭ kelkajn IKU-librojn de la antaŭaj jaroj.  Kiel la Rektoro estis nomumita Prof. Fabrizio Pennachietti, emerita profesoro de la universitato de Torino kaj iama prezidanto de AIS. Helpos kiel vic-rektoro prof. Davide Astori.

# Ĉeĥaj fervojistoj informas pri Esperanto

Septembre okazis en la urbo Plzeň Nacia tago de fervojo. Krom lokomotivoj, vagonaroj, fervoja tekniko kaj fervojoj miniaturaj estis prezentita ankaŭ nia agado. Nia „Esperanta tablo“ estis plena de varbiloj, informiloj, libroj ktp. Sed por ni estis tre agrable,  ke venis ankaŭ sufiĉe granda nombro de interesiĝantoj, kiuj demandisnin pri la internacia lingvo, pri niaj spertoj kun ĝi. Kun plezuro ni ankaŭ renkontiĝis kun esperantistoj el Plzeň, en nia lando, sed ankaŭ el Germanio.

Ladislav Hakl, ĈeFEA

# Okazis Paroliga Renkontiĝo en Venezuelo

Partoprenis:

- Germán Montero el la urbo Marakajbo (ŝtato Zulio)
- Leonardo León el la urbo Valencio (ŝtato Aragua)
- Alexis Otero Castellón el Svislando
- Ricardo Coutinho el la urbo Bonaero (Argentino).

La renkontiĝo estis riĉenhava, oni interŝanĝis spertojn rilate al niaj partoprenoj en la movado kaj pri niaj spertoj for de la lando (Venezuelo kaj Kubo ĉar Alexis partoprenis en la Kuba Esperanto-Asocio dum longa tempo antaŭ ol translokiĝi al Svislando. Mi bedaŭras ke aliaj ne reagis al la alvoko, oni scias, ke kelkaj en niaj karmaradoj havas problemojn rilate al interreto-servo kaj elektro-servo, nu, estas ege malfacile partopreni. Malgraŭ tio, ni denove faros alvokon.

Ricardo Coutinho el la urbo Bonaero (Argentino).

# Bourlot memorigita en AMINDA 124

La unua rubriko de ELSENDO N°124 de Aminda Radio Esperanto omaĝas al la itala



esperantisto Carlo BOURLOT, kiu forlasis nin en marto 2021. Li ja estis fervora pledanto por la malagasaj esperantistoj kaj multe kontribuis al Esperanto en Malagasio. Aliflanke, nia retradio kampanjas por la varbado pri abonado al la unika monata gazeto Pdf en Esperanto kiu raportas pri Malagasio, nome *Panoramo de la Granda Insulo*. Nia rubriko pri kulturo proponas belan kanton el Kongo kunlabore kun Vinilkosmo. https://youtu.be/9yTZSbvUpCQ

S-ro Henriél **Fidilalao Firaisana**

## ILEI kaj Unesko persiste pluiras

En ILEI ni estas provantaj pliigi niajn rilatojn kun Unesko utiligante valorajn spertojn kaj helpojn de kara François Lo Jacomo, estrarano de UEA. La ideo de kara Trezoro ja estas tute sekvinda, kaj mi esperas, ke ĉiuj ni kadre de UEA, TEJO, ILEI k.s. kontribuos al la kampanjo pri rekono pere de Unesko de La Esperanto-Tago en julio, laŭ niaj ebloj. Ekzemple, se (ek)estas konkretaj agoj, kiel subskrib(ig)ado de rilata peticio aŭ simile, kompreneble ni povas disanonci pri tio en niaj organoj, retejoj kaj sociaj kanaloj/grupoj.

Ahmad Mamduhi, prezidanto de ILEI.

## Novaj ligoj kun Barato

Kiel jam anoncite, mi prelegos pri Esperanto (pri la ekzamenoj de Itala Instituto de Esperanto) en la 8-a internacia konferenco de Azia Asocio pri Lingvo-Testado (AALA), ĉe la Universitato Anna de Chennai, Barato.

Alessandra Madella, ILEI

## Postpensoj kongresaj onde venas

Antaŭ unu monato en la septembra eldono de La Ondo de Esperanto (2022, №313) estis publikigita intervjuo kun la sekretario de LKK de la Montreala UK, Ĵenja Amis. Hodiaŭ ĉi tiu intervjuo, titolita “Mi estas feliĉa, kontenta kaj fiera”, aperis ankaŭ en la reto; legu ĝin ĉe https://sezonoj.ru/2022/10/montrealo-34/

## SMG vojaĝas, EKO kredeble silentos

Tio okazos inter la 16-a de 24-a de novembro. Mia celo estas Pisa en Italio, kaj mi ne kunportos komputilon, do verŝajne silentos en tiu periodo. Post reveno al Budapeŝto, certe mi pretigos komunikojn denove kun rezultoj de la vojaĝo, nur la dua de la jaro por SMG. La vizito inkluzivos viziton al la biblioteko/muzeo en Massa kaj la renkontiĝo en Pisa mem.

========= vortoj:  1220 =========

La Komunikoj iras al la Landaj kaj Fakaj Asocioj, al la Komitato de UEA, pluraj instancoj de ILEI, al la Estraro de TEJO, al unuopuloj, kiuj petis la ricevon kaj la anoj de pluraj pasintaj AMO-seminarioj.  Entute ĉ. 2700 ricevantoj – 1500 rekte plus plusendoj en Hungario, Italio, Slovenio  kaj aliaj landoj.

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.
Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado. La prezento estas ĝisdata ĝis majo **2022** (per EKO 2022-25). Vidu ilin laŭjare, kun klaraj enhavaj indikoj por ĉiu jaro depost 2014.

**ALDONU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj ktp.

**SUBTRAHU VIN:** Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.